

GAZETO



ANDALUZIA

Fondita en 1910

Eldonas: 1-a ESPERANTISTA
KONGRESO DE ANDALUZIO

Redaktoroj:

José María Rodríguez Hernández
Andrés Martín González.MA.
Alberto Franco Ramírez.SE.

Adresoj:

Eldona Centro: Grupo de Esperanto-IB Séneca.Av. Menéndez
Pidal 3/M CORDOBA-4.

Abona Centro: Centro Cultural GFU. Sección Esperanto
C/ Trinidad Grund 28,2ª MALAGA-1

Disenda Centro: Sevilia Esperanto-Asocio kaj SEJO
C/ Sol 75 SEVILLA-3

I N D E K S O

Ĉefartikolo	1
Informoj	2
Rememore al...	5
2a Andaluzia Kongreso	6
Paĝo de la Junularo	8
Andaluzia Voĉo	9
SEJO-Paĝo	10
Kuirarto	11
Amuzajoj	12

"Pri la artikoloj ĉi tie publikigitaj respondecas la aŭtoroj mem".

Kunlaboras ĉi-numere: Rafael Pleguezuelos, Julio Herrera
Antonio Rodríguez Gach, Manuel Ramírez.

P&LKE

ĈEFARTIKOLO

Dankon Andaluzio ĉar ĉe via tero ni naskiĝis. Dankon, ĉar via nomo famigis multajn viajn filojn; ĉar vi ŝanĝis historiajn epizodojn, ĉar vi loĝas inter ni. Fenizoj, romianoj, vizigodoj, araboj, kristanoj, ĉiuj kulturoj, sen distingi rasojn, religiojn, historion loĝis en via tero kaj fortigis via tra l' Universo.

Andaluzio, fruktodona tero, kies frukto estas laborata en la kampo de viaj filoj, kiuj penas por trovi celon de unuigo kaj espero: la terlaboristo pro sia pano, la metiisto pro siaj celoj.

Samkiel iufoje servis stelo por sekvi la Beletheman vojon, hodiaŭ en Andaluzio naskiĝas stelo de espero, simbolo de unuigo kaj frateco inter ĉiuj samideanoj. Patrino Andaluzio, akceptu je viaj piedoj, niajn simbolojn, verda-blankan vojon kiel vian standardon. Vivu ni la idealon de nia Majstro Zamenhof kaj nenio disigos al ni de nia esperantista idealo.

La Kordova Redakcio

GAZETO ANDALUZIA naskiĝis en januaro 1910 en San Fernando (Kadizo). Ĝi estis kreata de José Garzón Ruiz, fondinto ankaŭ de la unua E-klubo en Andaluzio. Post la malapero de LA SUNO HISPANA la tiama Esperanto-Asocio de Hispanio bezonis revuon kiel oficialan organon kaj ĉi-tiel en decembro 1910 GAZETO ANDALUZIA iĝis GAZETO HISPANA. Post 74 jaroj ĜA renaskiĝas kun la samaj aŭ pliaj fortej ol en 1910, dezirante kunigi la andaluzian esperantistaron kaj informi pri la movado en nia regiono al la ceteraj hispanoj.

ABONIGU AL GAZETO ANDALUZIA |

INFORMOJ

MALAGO

Verŝajne, nia partopreno en la ŝijara Hispana kaj Andaluzia Kongresoj, fortigis nin kiel Grupon kaj esperantistojn, ĉar post nia alveno de Zaragoza kaj Córdoba, ni jam pretis senlace labori por la disvastigo de Esperanto ĉiunivele. Resume, niaj por esperantaj agadoj estas jenaj:

- **KURSOJ:** Ni komencis propagandi la elementajn kurson kiun ni gvidos de la 4-a de Oktobro ĝis la mezo de decembro. Kiel propaĝandilon ni uzis afiŝojn kaj afiŝetojn kiuj estis gluitaj sur stratmuroj, paperkorboj, anonotabeloj en lernejoj, laborejoj kaj kulturcentroj. Krome, la lokaj ĵurnaloj aperigis artikolojn kaj la radioelsendoj disaŭdigis novaĵojn pri la kurso kaj pri Esperanto. Ĝi okazis marde, ĵaŭde kaj vendrede kaj estis gvidata de S-ano Julio Herrero, kiu uzis la metodon de Jorge Hess "¿Sabe Usted Esperanto?".

Krom ĉi tiuj intertempaj kursoj okazas dum la tuta lernojaro, perkoresponda kurso laŭ la metodo de ILEI pri kiu prizorgas S-ano Andrés Martín. Ĝi estas tre konvena por tiuj personoj kiuj, eĉ loĝantaj en nia urbo, povas ĉeesti nur unu aŭ du tagojn semajne. Nuntempe, ankaŭ lernantoj de Almeria kaj Granada lernas per ĝi.

Ĉiuvendrede kunvenas la progresintoj, sub la gvidado de Andréo por praktiki la lingvon skribe kaj precipe, parole.

La gejunuloj de la Grupo studas nun la eblecon aranĝi kurson "Esperanto por infanoj" kiu okazos ĉiusemptate, matene. En venonta bulteno ni informos pri ĝia disvolviĝo.

- **DISVASTIGO DE ESPERANTO EN ANDALUZIO:** Laŭ la konkludoj de la I-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, Malaga prizorgas pri la disvastigo de Esperanto en la du pli proksimaj urboj, t.e. Almeria kaj Granada. Dank' al la unua kontakto, pere de listo da glerntantoj aliĝitaj al Kurso de ILEI, ni sukcesis trovi du respondeculojn en ĉiu urbo, kiujn ni helpas lerni/perfektigi la lingvon kaj samtempe ili klopodas starigi Grupon. Do, oni povas diri ke la komenco estas esperiga.

- **2ª ANDALUZA KONGRESO DE ESPERANTO:** Ĉiu du vendredoj, la LKK kunvenas por pritrakti antaŭkongresajn aferojn. Ni jam decidis pri la dato, ejo, provizora programo kaj ni elektis la bildon

per la Poŝtkarto kaj la kovrilon por la Kongreslibro. Ekde la jarkomenco ni propagandos la Kongreson ĉiunivele. Ĉar ĉi tiu Kongreso estas por ĉiuj andaluzoj, kaj ni estas nur la LKK, ni petas de vi la sendadon de sugestoj, ideoj, ktp, kiu povus pli bonigi ĉi tiun okazantaĵon.

-NEKROLOGOJ (Malgaja Novaĵo): La pasintan septembron, pro terura malsano (la senlaboreco) "forpasis" en Malaga nia juna kara samideano Ricardo Albert. Por doni al li la lastan adiaŭliaj amikoj de la Grupo ĉeestis la haltejon de la aŭtobuso kiu kondukis lin al Madrido, kie lia familio loĝas. Antaŭ foriri, li donis al la Grupo 1 peseton, kiu ni gardos por ĉiam.

Je la tria tago, dank' al Madridaj Liceanoj, li "reviviĝis" k nun, ni ekscias ke li daŭrigas sian poresperantan laboradon kun kua HEJS-anoj. Li Pace Laboru !

-PRELEGOJ: Por la venontaj monatoj, ni faros prelegojn pri Esperanto ĉe diversaj ejoj, nome: Vegetara Societo, nia sidejo kaj la Kulturdomo.

I H S

SEVILJO

- Tuj post nia reveno al Seviljo el la Kongreso de Kordovo ni iris al kvar Seviljaj Radiostacioj por paroli pri Esperanto. Krome, ni ankaŭ ĉeestis regionajn, naciajn kaj internaciajn programojn (la unua en SER-Andalucia, la dua en Radio Nacional de España kaj la tria en Radio Exterior de España).

- Antaŭ ne longe ni povis scii, ke la Andaluza Kunveno serĉis kapablan esperantiston por traduki broŝurojn, librojn, ktp. Ki am ni iris al la Sidejo de la Andaluza Kunveno, ili sciigis al ni ke tiu posteno estis jam okupita de madridano. Ĉu denove okazos trismo malgraŭ la ekzisto de aŭtonomaj komunumoj? Ĉu en Andaluzio ne ekzistas bonaj esperantistoj? Oni povas konstati, ke denove ni estas konsiderataj malpli gravaj ol madridanoj.

- La pasintan 20an de Aŭgusto okazis kunveno de la LKK de la Sevilja Esperanto-Kongreso ĉijara nacinivele en la Sidejo de la Sevilja Esperanto-Asocio. Inter la temoj oni parolis pri la problemojde la elektita Kongresejodumsciere. La Kunveno ankaŭ rimarkis, ke ankoraŭ ni ne ricevis la dosieron pri la Zaragoza Kongreso, kiu estas tre grava por nia agado.

- Dum la fino de la Aŭgusta monato vizitis nia samideano Dirk Kertschmann, membro de GEJ kaj laboranto en HAPS, kie oni faras "Konoize"-n. Dum du tagoj, ni montris al li la urbon, kiun li tre ŝategis, ni parolis pri komunaj junuralaj problemoj, ktp. Ĉiam estas interesaj tiaj spertejoj.

- Tre venonte okazos la 2a Ŝakluda Ĉampioneco de SEJO. Oni in formas pri ĝi en "Revuo de SEJO".

- La 15an de Septembro komencis la unuaj kursoj de Esperanto en la sidejo de Sevilja Esperanto Akademio. La metodo uzata estas tiu de Fernando de Diego.

KORDOVO

- La Andaluzia Kongreso de Esperanto vere disvastigis nian lingvon en Kordovo, dank' al la ĵurnalistoj kiuj petis al ni informojn, intervjuojn, fotografiojn, ktp. Tiel ni parolis per diversaj radioj, aperis artikoloj pri esperanto en la du ĵurnaloj de Kordovo. Ankaŭ unu el la kordovaj samideaninoj verkis artikolon titolitan "Esperanto en Córdoba" en la revuo de la entrepreno kie ŝi laboris dumsomere.

- Komencis la Elementa Kurso de Esperanto en la IB Séneoa, ĉi-jare estas la unua fojo kiu ŝiuj gelernantoj estas Seneca-anoj, t.e. gelernantoj de nia Instituto, Antaŭaj jaroj ni ankaŭ devis propagandi la kurson en aliaj Liceoj, tamen ĉi-jare la lernantaro de nia Instituto sufiĉas.

- Esperanto en la lernejo jes, Esperanto en la Institutoj ja, Esperanto en la Universitato sendube, sed kion vi opinias pri Esperanto en la vinkeloj? Jesja, vi legis bone! En la plej tipa vinkelo de Kordovo jam aperas esperanto-frazo sur unu el la bareloj. Profitante la viziton, kompreneble tute kultara, kiun ni faris al ĉi-loko dum la Kongreso, la kelestro oferis al ni barelon por skribi ion. La Prezidanto de la LKK promisiis reveni por subskribi sur ĝi. Farite kaj dirite, post dudekkvar horoj li iris en la vinkelon, kaj tie subskribis kaj skribis tekston en Esperanto. La Grupo de Kordovo ekspensas eldoni poŝtkarton pri ĉi-loko, kiel tiu pri la Zamenhofa monumento en Vieno. Imagu la sukceson, esperantista barelo tuj apud la subskribo de F. Alvear, Gianina Facie, ktp.

Kiel rememoraĵo kaj samtempe kiel omaĝeto al niaj aktivople-
naj gesamideanoj de Kordovo, mi volus dediĉi kelkajn liniojn reme-
mori historian daton je la andaluza esperanta disvolviĝo. Mi ri-
latas kongreson, kiu siatempe akiris egan famon kaj sukceson kaj
kiu ja provas la profundan enradikiĝon de la esperantismo ene de
la vizitinda urbo de la Kalifoj.

Estis vere jaroj ege favoraj aŭ taŭgaj por ĉiaspeca novaĵo kaj
sendube, Esperanto iĝis furora allogaĵo. La Tria Iberia Kongreso
Esperantista (jen la titolo de la rememorenda renkontiĝo) okazis
en Kordovo dum majo de 1925 kaj entenis sekvaĵajn enhavoriĉajn pro-
gramerojn:

- Sabaton 9an { Dumtage: Alveno de la gekongresanoj.
Vespere: Interkonatiĝa Kunveno.
- Dimanĉon 10an { Matene: Solena Malferma Kunsido.
Posttagmeze: Ekskurso en la montaron.
Amuzoj: Amuzoj.
- Lundon 11an { Matene: Dua Laborkunsido.
Posttagmeze: Vizito al la urbo, Moskeo kaj muzeoj
Vespere: Tria Laborkunsido.
- Mardon 12an { Matene: Ferma Kunsido
Posttagmeze: Ekskursoj.
- Merkredon 13an Ekskurso al Seviljo.
- Ĵaŭdon 14an Ekskurso al Granada.

Ĉeestis la historian Kongreson entute 107 gekongresanoj, inter
kiuj la geblinduloj aliĝis senpage. Krome, nia neforgesinda Kordov
Kongreso prezentis tutan enspezon je 848'93 pesetoj kaj samkvantan
elspezon, kaj havis jenan kongresan komitaton:

Honora Prezidanto:	S-ro Pable Linares Rapet.
Prezidanto:	S-ro Francisco Serrano Olmo.
Kasisto:	" Juan Serrano Olmo.
Sekretario:	" Jorge Berger Knoll.
Voĉdonantoj:	S-roj Francisco Azorin Izquierdo Rogelio Luque Díaz Pantaleón Marivela Sanz

Por blindulaj aferoj: F-ino Ana Mejías Román.

Oni faris okaze de ĉi tiu grava evento du eldonaĵojn: unu, raportan, kaj alian, gvidlibran, kiu emociige tekstis jene en sia antaŭparole:

"Kion ni povas sincere konfesi estas, ke nin gvidis bona volo. Sed, niaj rimedoj estis sufiĉe modestaj, kaj nur dank' al la helpemo kaj oferemo ni povas prezenti nian kongreslibreton. Ĉi estu per la partoprenantoj de la Kordova samideana kunveno memoraĵo pri la urbo, pri la tuta Andaluzio kun ĝia suno, ĝiaj floroj kaj ĝiaj ceteraj ŝarmoj"...

Historio, ĵae, pesinfludas kaj ripetigas ĉiame...

Manuel Ramirez

2A ANDALUZIA KONGRESO DE ESP-O

MALAGA 17, 18, 19 Aŭgusto 1984

PROGRAMO (Rilate al laborkunsidoj)



SABATON 18an

- Matene: 1) Informoj de ĉiu Grupo pri iliaj agadoj, inter la unua kaj dua kongresoj, por la disvastigo de Esperanto en Andaluzio. (Kiel decidite en Kordovo, ĉiu grupo zorgos pri la disvastigo de Esperanto kaj laŭebla helpo por fondi Esperanto-Grupojn en unu aŭ du pli proksimaj provincoj).
- 2) Diskuto pri la informoj de la unua punkto.
- Vespere: 3) Informoj de la komisionaroj pri la disvolviĝo de la statutprojekte de la Andaluza Asocio/Federacio. (Konsiderante ĝian gravecon, oni elektis komisionon kiu pristudos la statuojn kja aktivecojn de la estonta Andaluza Asocio aŭ Federacio).
- 4) Diskuto pri la informoj de la tria punkto.

DIMANĈON 19an

- Matene: 5) Informoj de la organizantoj de nia komuna revuo aŭ bulteno pri ĝia disvolviĝo.
- 6) Malfermita punkto por iuj ajn temojn.
(Ni deziras pritrakti la temon "Recipokaj rilatoj inter niaj grupoj de Andaluzio kaj esperantistaj organizoj en Hispanio)."

NOTOJ:

Krome de laborkunsidoj, ni oferos al la kongresanoj la jenajn aranĝojn:

- Belajn Interkongaĵ Vesperon kaj Malfermon de la Kongreso.
- Teatraĵojn en esperanto.
- Teatraĵojn en hispana lingvo, pri andaluzaj aferoj de Frato Quintero.
- Viziton al la strato Esperanto.
- Ni disponos senpagan dormejon por almenaŭ 25 gejunuloj.
- Post la tagmanĝo kaj ĝis la komenco de vesperaj laborkunsidoj la kongresanoj kiuj deziras, povos rairi al la kongresejo por aŭskulti esperantajn kantojn.
- Je 15 minutoj piede, estas la plaĝo "Antonio Martín".
- Apud la kongresejo, estas la preĝejo "Stella Maris".
- Multfoje la plej interesaj momentoj estas tiuj kiuj ne estas antaŭpreparitaj. Do, ni atendu ĝis kiam ni estos kune.

La LKK de la 2a Andaluzia Kongreso de
ESPERANTO

PAĜO DE LA JUNULARO

Unu el la plej gravaj bazoj de la nuntempa Esperanto-movado en Andaluzio estas sendube la junularo; ŝajnas ke en nia lando la gejunuloj povas labori sen multaj problemoj en diversaj Esperanto-Asocioj, kie ni, povas ŝuti nian forton kaj kreemon por la disvastigo de nia lingvo, kaj ĉi-ĉio bedaŭrinde ne okazas ĉie.

Male en Andaluzio ni povas kunlabori kun la maturuloj ene de la Esperanto-Movado. Pro tio devas naskiĝi junulara E-asocio t.e. la AEJ (Andaluzia Esperanto-Junularo); komence ĝi estas la kunigo de ĉiuj andaluziaj gejunuloj, kiuj jam laboras por organizi la 8an HEJS-Tendaron en Aprilo 84. Ni povas prezenti antaŭniaj junaj samideanoj AEJ-tiumomente. Vi nedevas forgesi ke la dua regiono laŭ la nom-bro de HEJS-anoj estas Andaluzio, kaj ni devas intenci esti bonaj kaj laboremaj membroj de ĉi-organizo.

Ni sendis leterojn al la andaluziaj grupoj por informi pri AEJ, kaj petante ĉiujn gejunulojn kunlaboru por sia kreskado. La junularo jam havas en ĉi-revuo sĉan paĝon kaj ĉio tiam ni profitos. En la unua numero estas la kordova ĵunularo kiu verkas ĉi-artikolon, tamen en la venontaj numeroj estos junaj gesamideanoj de aliaj urboj kiuj faros ĝin.

Finfine, nur ni volas diri ke ni devas atingi ke en la statoj de la onta Andaluzia Esperanto-Federacio aperu artikolo temente kaj helpante al la andaluzia junularo.



8a HEJS-Tendaro

Okazos en Kordovo la venontajn 20an-23an de Aprilo la 8a Kunveno de la Hispana Esperantista Junulara Societo. Samtempe oni festos la 25an jubileon de ĉi-organizo. Juna Andaluzio ĉeestu ĝin, jen via ŝenco. Ĝi estas la unua tendaro kiu okazas en Andaluzio. Pliajn Informojn petu al HEJS-Tendaro Ap.611

CORDOBA

ANDALUZIA VOÇO

Escribete: Rafael Pleguezuelos.

Estimados Compañeros:

Ha llegado el momento de que nuestra lengua se difunda por todas las latitudes de la Tierra. Debemos comprender que saber Esperanto no es sólo estudiarlo y aprenderlo, nuestra función es también difundirlo a través de nuestras propias fronteras. Vivimos en una época en que tenemos facilidades de todo tipo para su difusión: enseñanza, propaganda, comunicación, etc.

El Esperanto necesita de la radio para su enseñanza. Este es el medio más trabajado para la difusión de la Cultura. En líneas generales es el más cómodo, fácil de utilizar, cubre más radio de acción, etc. Si cruzamos la fronteras de España veremos que las emisoras de onda merta de otros países son utilizadas para el Esperanto. Así por ejemplo Radio Varsovia con 2 $\frac{1}{2}$ horas diarias, Radio Suiza con 40 minutos. Y la mayoría a partir de 15 minutos semanales. Aunque parezca insignificante ¿Qué hacemos nosotros? En realidad las emisiones en Esperanto, como todo en la vida, necesita una preparación y un tiempo que a veces no podemos dar. Pero debemos pensar que la radio empieza en nosotros mismos. Imaginad una emisión de esperanto para Andalucía ¿No habría más satisfacción en oír a nuestros compañeros andaluzes que una emisión de Radio Varsovia?

Compañeros, para finalizar, comprendamos que el ideal de unión y esperanza se encuentra trabajando con el Esperanto, para ello busquemos todas sus posibilidades. Yo con RADIO-ESPERANTO ¿Tú?

- Cualquier información sobre emisiones extranjeras en Esperanto, pedís escribir a esta sección "Andaluzia Voço".

SEJO

1. La bona membro de SEJO neniam parolos esperante en la Klubejo.
2. La bona membro de SEJO neniam pagos la monatan kotizon.
3. La bona membro de SEJO neniam partoprenos ĉiu monate en la revuo.
4. Inter la bona membro de SEJO kaj la membro de Sevilja Esperanto Asocio estas multa kamaradeo.
5. La bona membro de SEJO ĉiam estos ludanta tablotenison en la klubejo, kaj li ne dediĉos sian tempon al alia afero ol tiu.
6. Se la estraro de Sevilja Esperanto Asocio diras, ke oni devas purigi la Klubejon de la 8-a ĝis la 9-a, la bona membro de SEJO aperos je la 9-a kaj kvarono.
7. Se vi obeas ĉi koncizan regularon vi estos bonaj membroj de SEJO, kaj eĉ pli, ho filoj! Vi estos homoj.

LA EKSTRARO DE S.E.H.O.



KUIRARTO

Jen tio, kio estas la plej konata manĝaĵo de Andaluzio: 1
"gaspaŝo". Jen la almiksaĵoj:

- 1 supkulero da salo.
- 2 ajleroj.
- 1 kukumo.
- 2 kapsikoj.
- $\frac{1}{2}$ da cepo.
- $\frac{1}{2}$ kilo da tomato (sen ŝelo).
- $\frac{1}{4}$ da pano (malmola de la antaŭa tago).
- 1 supkulero da oleo.
- 3 supkuleroj da vinagro.
- $\frac{1}{2}$ -1 litro da akvo.

Jen farado:

- 1-e Vi devas en akvujo subakvigi la panon.
- 2-e Poste, vi pistos en dispecetigejo kukumon kaj hapsikon.
- 3-e Denove pistu kune kun la tomatojn.
- 4-e Denove pistu kune kun oleo, vinagro kaj jam la sekita pano, t.e. elirigu la akvon per viaj manoj mem.
- 5-e Movu la tuton kune kun malvarmega akvo kvanto je $\frac{1}{2}$ -1 litroj, kiel al vi plaĉos.

Poste ankaŭ oni povas manĝi kune kun pecetoj da cepoj, da pano, ktp.

Tio estas por kvar personoj dum du tagoj, proksimume. Ho manĝu ĝin en varma tago.


BONAN APETITON !

A.R.G.

AMUZAĴOJ

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11

A
B
C
Ĉ
D
E
F
G
Ĝ
H
Ĥ



HORIZONTALE

A. Vokalo. B. Leksemo de MANO. C. Akuzative, ĉiu parto de teatra verko, ludata de ĉiu aparta aktoro. Ĉ. Akuzative, iu ĉefurbo de Centrameriko. D. Adverbo Poseda Adjektivo. Sufikso montranta frakcion. E. Tute neevitebla. Akuzative, nomo devenanta de RARA. F. Nomo de litero. Returnite, leksemo de GENO. Returnite, sufikso montranta ĝeneralan ideon de naskiteco. G. Returnite kaj akuzative, ago aranĝi. Ĝ. Tiu kiu estas anta, returnite kaj akuzative. H. Poseda adjektivo. Ĥ. Konsonanto.

VERTIKALE

1. Konsonanto. 2. Adverbo. 3. Akuzative, Sankta Patro. 4. Returnite, sufikso montranta ensemblon. Konsonanto. Sufikso montranta parton. 5. Akuzative, ŝanĝo de mono. 6. Purigi per balailo. Returnite, kun formo de pinto. 7. Returnite kaj akuzative, ŝanĝaranĝo de la literoj de vorto por formi alian vorton. 8. Nomo de litero. Vokalo. Returnite, sufikso montranta ensemblon. 9. Rilata al nordo. 10. Returnite kaj akuzative, nedifina pronomo. 11. Konsonanto.

DUM NIAJ KUNVENOJ PAROLU NUR ESPERANTON !

BONVOLE, NENIAM KROKODILU ! KONSENTITE ?

IMPRESOS

DIFUSION DE LA CULTURA
DISVASTIGO DE LA KULTURO

"GAZETO ANDALUZIA"
Disienda Centro
C/ Sol 75

SEVILLA-3